

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 515

SEPTEMBRO 1948

LEGOLIBRO POR SUPERAJ KURSOJ KAJ MEMKLERIGO

De IVAN SARAFOV



232 paĝoj, broŝ. Prezo 7 ŝil., aŭfranko 6p. (30 rpk.)

“Aĝrable impresas la objektiva prezento de materialo, kiu estas samtempe instrua kaj interesa. Legante ĉi tiujn tekstojn, la studanto nekonscie asimilos multajn informojn, kiujn havigi necesus tralegi grandan kvanton da libroj. La informoj estas ĉerpitaj el multaj fontoj kaj nedetale skizas diversajn fazojn de la evoluo de la Esperanto-movado.”

“Aparte interesaj estas la notoj pri la elvolviĝo de la Laborista Esperanto-movado, kaj eksterlandanoj legos kun intereso kaj ĝuo la ĉerpaĵojn el la Bulgara literaturo.”



Eldonita de

BULGARA ESPERANTISTA KOOPERATIVO

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

34-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

BOURNEMOUTH

6-13 AŬGUSTO

1949

Kongres-Oficejo: UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
HERONSGATE, RICKMANSWORTH, (HERTS.), ANGLUJO

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 34-a Universala Kongreso de Esperanto kaj
kunsendas

Familia nomo (1). S-ro, S-ino, F-ino.....

Personaj antaŭnomoj (1).....

Profesio (2)

Nacieco (2).....

Urbo (1).....

Strato kaj n-ro (1).....

Lando (2)

.....194.... Subskribo.....

(1) *En nacia lingvo.* (2) *En Esperanto.*

Nomo de edzino aŭ edzo.....

INFORMOJ

Skribu klare, prefere per
skribmaŝino aŭ presliteroj.

Laŭ la angla monsisistemo
12 pencoj = 1 ŝilingo
20 ŝilingoj = £1.

Tuj post ricevo de la
kotizo kaj aliĝilo oni sendos
provizoran karton al la
kongresano. En konvena
tempo ĉiu kongresano
ricevos mendilojn por
loĝejo, ekskursoj, k.t.p.

Estas akceptataj ĉiuj
pagiloj ŝanĝeblaj en banko,
internaciaj poŝtmandatoj,
k.t.p., sed oni *ne* sendu
monbiletojn el eksterlando
ĉar tio estas malpermesata.

Glumarkoj. Tre belaj
glumarkoj estas haveblaj,
prezo 20 por 6p. aŭ 2 rpk.
Mendu kaj uzu ilin.

Blinduloj. Konforme al
la kongresregularo blindulo
kaj lia gvidanto ricevos
senpagan kongreskarton ĝis
la fino de Marto 1949;
poste ili devos pagi kongres-
kotizon po duono de la
ordinara tarifo. La aliĝilo
de blindulo devas esti
subskribita de blindula
organizaĵo aŭ de
okulkuracisto.

Donacoj por la kongresa
kaso aŭ la blindula kaso
estos bonvenaj.

KONGRESO-KOTIZOJ

	ĝis	ĝis	poste
	31-12-48	31-3-49	
Kongresano ..	30 ŝil.	35 ŝil.	40 ŝil.
Edzo aŭ edzino de kongresano ..	15 ŝil.	17ŝ. 6p.	20 ŝil.
Junul(in)o, ne pli ol 20-jara ..	12ŝ. 6p.	15 ŝil.	20 ŝil.

Aliĝilo sen pago estas senutila.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

41a JARO Septembro 1948
N-ro 515 (9)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto :
H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo	-	£5 anglaj
$\frac{1}{2}$ paĝo	-	50 ŝil. anglaj
$\frac{1}{4}$ paĝo	-	25 ŝil. anglaj
$\frac{1}{8}$ paĝo	-	12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkuponon por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

33-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

en Malmö, Svedujo : 31/7—7/8/1948

Brila sukceso. Harmonia kunlaboro. Gajaj ekskursoj kaj festoj. Somera universitato kun eminentaj prelegistoj kaj interesata publiko. Plenaj salonoj.

Alveno. Estas konata fakto, ke Esperantujo ne havas limojn. Kiam ni alproksimiĝas al ĝia ĉefurbo—kiu ĉi-jare estas Malmö—ni almenaŭ ne povas rimarki, kiam ni trapasas ilin. En vagonaro aŭ sur ŝipo okazas renkontiĝo kun la unua civitano, kun kiu ni povas paroli nian lingvon, baldaŭ troviĝas la dua kaj tria, la konversacio plivigliĝas, kaj antaŭ ol ni rimarkas tion, ni estas meze en societo nur de samideanoj. Sed tiun senlimecon la regantaj ŝtatoj bedaŭrinde ne ĉiam volas konfesi—ili malfaciligas nian vojaĝon per devigaj pasportoj kaj vizoj, per malpermeso de devizoj k.t.p. ĝis fine oni ne scias, ĉu estas eble efektiviĝi sian deziron partopreni en la ĉiujara samideana festo en la ĉefurbo. Nun ni tamen rimarkas, almenaŭ ĉe la dana limo, ke la dogano estas nura formalajo—la kofroj estas krete signataj, nemalfermitaj. Do, ĉio iras relative glate. Ni veturas al la kongresejo kaj ricevas paketon de diversaj dokumentoj, inter kiuj la kongresa insigno estas la plej grava jam pro tio, ke ĝi rajtigas al senpaga uzo de urbaj tramvagonoj kaj aŭtobusoj.

La interkonatiĝo komenciĝas tuj—malgraŭ la kongresa programo, kiu postulas unue la ekspedon de du kunsidoj : U.E.A.-Estraro kaj Solena Malfermo. Sed la interkonatiĝo ne iras same glate, kiel la ricevo de dokumentoj kaj la trovo de loĝejo. Kiam mil kvincent personoj kolektiĝas kaj ĉiuj volas serĉi sian korespondan amikon, kiun li neniam vidis, la rezultoj ne estas tuj videblaj. Kaj ilin malhelpas la ĝojokrioj kaj salutoj de tiuj samideanoj, kiuj jam antaŭe vidis unu la alian, kaj nun retrovas siajn amikojn.

Solena Malfermo. Sed nun ni devas fini la manpremendon. La grandan teatrosalonon plenigas mil kaj ducent—eble tricent—kvarcent—kongresanoj, kiuj povis venki ĉiujn barojn kaj alveturi. La definitiva nombro de aliĝintoj atingis ĉ. 1800, sed kiel vi bone scias, kelkaj renkontis nevenkeblajn malhelpojn. La Estraro prenas siajn sidlokojn sur la estrado kaj baldaŭ sonas la imponaj tonoj de ruĝa-kruca kornorkestro, la malnova sveda marŝo *Carolus Rex*. Tuj post ĝi, dum la Himno serĉas vojon el ĉiuj koroj sub la la altajn arkadojn, ŝajnas, ke la nevidebla, sieĝanta kaj preskaŭ sufoka spirito de la Esperantistaj kongresoj alvenis kaj kaptis la tutan ĉeestantaron : En la mondon venis nova sento. . . .


Wilhelm Johansson el Malmö deklamas sian prologon pri la ideo, kiu nin ĉiujn kolektis ĉi tie, kaj dankas al la genio, kiu tion ebligis al ni. Kaj ĉio komencas ruliĝi : Jan Strönné, prezidanto de L.K.K., salutas mallonge kaj legas telegramon de la ĉefministro de la Sveda registaro, Tage Erlander, kiun la kongreso dankas. La prezidanto

de la urba konsilantaro, Emil Olsson, salutas. E. Malmgren, prezidanto de U.E.A. dankas la urbestaron de Malmö, la svedan registaron, la preparan komitaton kaj la ĉeestantojn. Li diras, ke ni estas feliĉaj povi ĉeesti la kongreson, sed ni ne forgesas la forestantojn nek falintojn el niaj vicoj. Li atentigas, ke la nuna kongreso volas antaŭ ĉio turni sin al la junularo, ne nur por propagandi inter la junularo kaj tiel progresigi Esperanton, sed ĉar ni celas la bonon de la junularo, kaj ĉar ni volas per la junularo krei pli feliĉan homaron.

Kantas la svedaj *kantisto-fratoj* svedajn melodiojn kun Esperantaj vortoj.

Okazas elektoj: prezidanto Jan Strönné, vicprezidanto D-ro K. Söderberg, sekretario C. C. Goldsmith, la ĝenerala sekretario de U.E.A., vicsekretario O. T. Nicolaisen, la ĝenerala sekretario de L.K.K.

La prezidanto de la kongreso dankas kaj deziras sukceson al la laboroj de la kongreso, kaj tuj sekvas la salutoj de la oficialaj reprezentantoj de diversaj registaroj: Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Finnlando, Italujo, Nederlando, Norvegujo. La reprezentantoj estas konataj Esperantistoj kaj agantoj en la nomitaj landoj, kaj ŝajnas, ke kelkaj el ili forgesas pri sia tasko reprezenti la iom malvarmajn registarojn, kaj ili ekparolas el la fundo de sia koro kaj pensojn de la samideanoj de sia lando. Post ili tamen sekvas la personoj, kiuj estas komisiitaj paroli en la nomo de la landaj organizaĵoj. Ni citu la landojn: Aŭstrujo, Belgujo, Britujo—kun bonvenigo por la kongreso en 1949 —, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Egiptujo, Finnlando—kun la espero ricevi la kongreson en 1951 —, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Islando, Italujo, Jugoslavujo, Nederlando, Norda Irlando, Norvegujo, Pollando, Triesto, kaj Usono. La delegitoj konkuras unu kun la alia por esprimi en la maksimuma tempo



Ludoviko Zamenhof
(en la mezo)

de unu minuto la sentojn, kiuj plenigas iliajn korojn.

Salutas la kongreson Ludoviko Zamenhof kiel reprezentanto de la Zamenhofa familio. Muziko, kelkaj informoj kaj *Vivu Esperanto*, kaj ni transiras en la antaŭhalon de la teatro por daŭrigi la interrompitan interkonatiĝon. Tion tamen penas per ĉiuj fortoj malebligi muziko de la orkestro de Ruĝa Kruco kaj kantado de la *kantofratoj*, kies tonoj superplenigas la halon kaj preskaŭ nebligas aŭdi la longe sopiritajn vortojn de subite trovita amiko.

Kaj tiel fariĝas el vespero kaj nokto nova tago.

Dimanĉo. Du diservoj, laŭ la tradicio. Poste komuna fotografado sur la amfiteatraj benkoj de la urba sportejo. Daŭrigo de la interkonatiĝo kaj maŝinpafado de dekoj da kameroj, krom la oficialaj. La vetero estas belega, sed preskaŭ preme varma, kvankam ni aperas ĉie nur kun ĉemizoj.



Grupo de naciaj kostumoj

Nun ŝajnas al mi, ke ni dividiĝas en plurajn grupojn. Okazas diversaj ekskursoj en la urbo laŭ la belegaj kanaloj kaj al riĉaj muzeoj, ekster la urbo al kasteloj kaj aliaj historiaj vidindaĵoj, al marbordaj banejoj kaj eĉ sur la maro mem. Diversaj fakaj kunvenoj laboras, filmoj estas prezentataj, fabrikoj vizitataj. Kaj kiu havas tempon kaj kronojn, vizitas la riĉajn magazenojn kaj vendejojn de la urbo. Ni kiuj devas sidi en la laboraj kunsidoj, vidas nur iam kaj tiam la radiantajn vizaĝojn de la kongresanoj, kiuj scias bone ĝui la kunestadon kaj libertempadon, kaj ni konjektas, ke ili estas kontentaj—ne, ravitaj, feliĉaj. Ne kredu, ke ni envias ilin; ni ŝatas vidi la gajajn okulojn de la junuloj, kaj ni fidus je tio, ke ili daŭrigos nian laboron.

Pri la fakaj kunvenoj, kiuj signifas seriozan laboron en la kadro de *Kongreso de kongresoj* vi povos legi en la proksima numero de *Esperanto*. Nun estas pritraktataj antaŭ ĉio

La Laboraj kunvenoj de U.E.A. kaj ĝia Komitato. Ni aŭdas ankoraŭ salutojn de Palestinaj Esperantistoj, de Estonaj loĝantoj en Svedujo, de Hamburga kaj Nordorient-germanaj samideanoj, de la Internacia Amikeca Ligo, de la klubo en San Francisko, de la kultura komisiono de Ĉeĥoslovaka fervoja centra oficejo, de Hispanaj Esperantistoj, de la Tutmonda Junular-Organizo kaj de Universala Ligo. Krome centoj da aliaj alvenis, kies nomojn ni ne povas publikigi. Ni aŭskultas raporton pri financaj malfacilaĵoj, kaŭzatoj de la nepageblo de mono el diversaj landoj, kaj kiel respondo al tio dekoj da ĉeestantoj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis kiel individuaj membroj de U.E.A. tion faras nun, dum aliaj promesas tion fari tuj reveninte hejmen—ĉar kronoj svedaj mankas al ili.


S-ro Oliver raportas pri la deklaro adresota al UNO. Ĝis nun subskribis 7.6 milionoj, el kiuj pli ol 865.000 estas individuaj subskriboj—inter ili 33.000 instruistoj!—la resto kolektivaj subskriboj de diversaj organizaĵoj. Kiam la parolanto demandas: Ĉu vi estas kontentaj? la kongreso unuanime respondas: Ne! Ni deziras atingi la nombron de dek milionoj, pri kiu Zamenhof iam revis. Kaj tempon ni havas ĝis la fino de la jaro.

La servoj de U.E.A. disvolviĝas: ekzistas pli ol 2400 delegitaj oficoj. La nombro de delegitoj ne estas precize enkalkulita ĉar kelkaj personoj plenumas du oficojn. Tio ja estas laŭdinda agemo, sed aliparte ĝi montras, ke ni ne ĉiam havas sufiĉe multajn laborfortojn por dece dividi la taskojn.

La laborkunsidon kaj la Komitaton pensigas la problemo pri pagado de kotizoj el Aŭstrujo, Germanujo kaj kelkaj aliaj landoj. La Esperantistoj deziras aliĝi, sed ne ĉiam estas facile, eĉ eble, aranĝi la pagojn. S-ro Dahlmann dankas la diverslandajn samideanojn kiuj donis sian subtenon (en formo de kredito) al multaj Germanoj. Kelkaj plendoj estas aŭdataj: delegitoj, kiuj ne komprenas siajn devojn de servado, kaj samideanoj, kiuj miskomprenas la taskojn de la delegitoj, kaj petis eĉ fakajn delegitojn pri individua korespondo, al kiu ilia tempo kompreneble ne povas sufiĉi, ne parolante pri tio, ke ĝi ne apartenas al ilia tasko.

La centra punkto de la pritraktoj estas la propagando—multaj evidente preferus diri: klerigo de la ekstera publiko pri la uzebleco de nia lingvo. D-ro Lapenna faras elokventan kaj profundan diskurson pri la temo. Li montras la erarojn, kiujn la Esperantistoj faris kaj kiuj tiom malfaciligis la disvastigon de Esperanto, ke oni preskaŭ devas miri, ke nia lingvo ankoraŭ ekzistas post konstanta 60-jara malpropagando.

Inter la eraroj fare de le Esperantistoj li citas, ke ni nomas nian lingvon *arta*, kvankam ĝi ne estas pli artefarita ol kiu ajn el la modernaj kulturlingvoj; ke ni nomas ĝin *helpa* lingvo internacia, kvazaŭ ekzistus aliaj lingvoj internaciaj, inter kiuj Esperanto ludus nur duagradan, *helpan* rolon; troigon de la eblecoj de nia lingvo en la rolo forigi militon; nesufiĉan konon de la lingvo de la parto de la propagandistoj; sengustajn propagandilojn kaj sentaktan procedon en aŭtoritataj medioj. Fine li akcentas, ke varmecon ĉe Esperantisto al nia komuna idealo ni ne taksu laŭ la nombro de kvinpintaj verdaj steloj en liaj vestoj, sed laŭ la kono de la lingvo, pago de la kotizoj al niaj organizaĵoj, abono al gazetoj, aĉeto de literaturo. En la sekvanta vigla interparolo diversaj samideanoj faras bonajn kaj atentindajn proponojn, kiuj parte celas la evoluon de nia informa servo kaj lernolibroj kaj aliaj instruiloj (interalie estas proponata filma instruilo en formo de 12-leciona sonfilmo kun adapta lernolibro), parte atentigas la neceson enpenetri en novajn mediojn—ne-esperantistajn societojn kun internaciaj celadoj, kulturfestojn kaj fremdlingvajn koloniojn de la havenaj, komercaj kaj ĉef-urboj. Fine, F-ino Noll kortusè parolas pri tio, ke ni devas havi amon al Esperanto. Zamenhof neniam pensis pri ofero de malgravaj valoroj (cigaretskatoloj, kies prezo egalas al la individua membrokotizo de U.E.A.). Li oferis sian tutan vivon al Esperanto.



Esperanto-pioniroj
F-ino Noll, S-roj Nylén kaj Postnikov

En alia laborkunsido K. Söderberg akcentas pri la valoro de someraj universitatoj, ne nur en la celo progresigi la lingvoscion de Esperantistoj, sed antaŭ ĉio por efektivigi la rolon de Esperanto kiel kulturperanto inter la nacioj. Li rekomendas la konstantan, ĉiujaran efektivigon de altlernejoj kun seriozaj Esperantaj programoj

en kiel eble plej multaj landoj. Friis raportas pri simila laboro dum multaj pasintaj jaroj en Helsingör (Elsinoro). Magnússon atentigas pri la graveco eduki instruistojn de Esperanto per la universitatoj. Setälä raportas pri la someraj kursoj de la Finnlanda instituto, Málik pri la Ĉeĥoslovaka, kaj Isbrucker raportas pri la Esperantista Akademio. Szilágyi akcentas la gravecon de intima kunlaboro inter tiuj altlernejoj, kaj Dahl memorigas nin pri tio, ke la universitatoj montras praktikan servadon de fakaj intereso, tiuj de instruistoj. F-ino Noll atentigas, ke ni ne instruu nur uzi la lingvon sed ankaŭ defendi ĝin kontraŭ memfidaj kritikantoj. La kongreso akceptas rezolucion, diktitan de K. Söderberg:

“La 33-a Universala Kongreso komisiu al la Komitato de U.E.A. provi instigi la landajn Esperanto-federaciojn, aŭ en ilia propra reĝimo aŭ pere de ilia Esperanto-organizo, aranĝi internaciajn klerigajn kaj sciencojn kursojn en Esperanto, prefere en kunlaboro kun universitatoj aŭ kun universitatuloj kiel prelegistoj kaj tiuokaze sub la nomo Someraj Universitatoj”

La Komitato studas la eblecojn enkonduki nian lingvon en la lernejojn de diversaj landoj kaj la starigon de kursoj por instruistoj en kunlaboro kun la registaraj aŭtoritatoj. Ĝi komisiis unu el siaj membroj prepari proponon por starigo de internaciaj konkursoj ĉe la kongresoj—eble ia nova formo de *Floraj Ludoj*. Kaj ĝi studas la problemojn naskiĝantajn el la ĉiam kreskanta nombro de personoj, kiuj deziras partopreni niajn kongresojn.

S-ro Magnússon proponis, ke U.E.A. provu okazigi internaciajn kursojn celantajn eduki Esperanto-instruistojn, Esperanto-propagandistojn k.s.

Somera Universitato. Ĉiun matenon okazas prelegoj de kompetentaj specialistoj pri diversaj temoj inter astronomio kaj batalo kontraŭ malutilaj insektoj, vivo de laponoj, malnova literaturo popola, internacia juro, moderna literaturo kaj kooperativa agado. Sub la direktado de la sperta rektoro de Sveda Esperanto-Instituto, D-ro Söderberg, kaj per la vigla partopreno de la Esperantista publiko, kiel aŭskultantoj, ĝi fariĝas brila sukceso. Eble ni povos alimaniere reveni al la afero, kiun ni nun ne povas eĉ resumi, pro manko de libera papera spaco.

Sed ĉio tio ne sukcesas plene kontentigi la aktivecon de la kongresanoj. Kvankam la tagoj estas plene ŝarĝitaj per universitato, laborkunsidoj, fakaj kunsidoj, ekskursoj k.t.p. senfine, ankoraŭ nokte funkcias privata *nokta universitato* de la junuloj loĝantaj en la komunloĝejo. Tie ili pritraktas lingvajn, sciencajn kaj propagandajn problemojn inter la horoj 00.00 kaj 03.00 ĉiumatene.

Ferma Kunsido. Sed nenio povas daŭri eterne. Fine ni venas al Sabato kaj la Ferma Kunsido. La fakaj kunsidoj prezentas siajn raportojn kaj la kongreso mem aprobas gravan rezolucion preparitan de la Komitato kaj prezentatan al la kunsido de D-ro Lapenna:

“La 33-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta la 31-an de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto en Malmö, kiun partoprenis 1.800 reprezentantoj el 33 landoj,

konstatas,

1. ke la progreso de materiaj fortoj, scienco kaj teknikaj rimedoj ĉiam pli kaj pli kontaktigas rekte aŭ malrekte la apartenantojn de la diversaj nacioj kaj ke tial ĉiam pli sentiĝas la bezono de unu neŭtrala kaj facila internacia lingvo, aplikebla sur ĉiuj kampoj de la moderna internacia vivo;
2. ke la Internacia Lingvo Esperanto, malgraŭ la diversspecaj obstakloj al internacia rilatado kaj aparte la du grandaj militoj, detruintaj la bazojn de internacia solidareco, konstante progresis kaj disvastiĝis, atinginte hodiaŭ jam riĉan sciencan kaj beletran literaturon, multnombrian gazetaron kaj praktikan aplikon en diversaj branĉoj de la ĉiutaga vivo, fariĝinte tiamaniere ne nur skribata sed ankaŭ flue parolata, vivanta lingvo por centmiloj da homoj en ĉiuj partoj de la mondo;
3. ke ĉiuj ĉi konsiderindaj rezultoj estas ĝis nun atingitaj preskaŭ ekskluzive per la sindona laboro de unuopuloj, sen ia ajn oficiala apogo de la registaroj kaj precipe de la internaciaj kaj interŝtataj institucioj,

sekve la kongreso

decidas:

1. Rekomendi al ĉiuj personoj parolantaj la internacian lingvon kaj al ĉiuj organizoj por disvastiĝo de internacia lingvo intensigi sian laboron precipe inter la tutmonda junularo kaj instruistaro;
2. Esprimi sian dankon al ĉiuj radiostacioj, kiuj uzas la internacian lingvon por elsendoj, kaj al la tutmonda gazetaro, kiu favoras la lingvon;
3. Peti la registarojn de la diversaj landoj serioze konsideri la eblecojn enkonduki la internacian lingvon en seminariojn kaj lernejojn kiel ordinaran aŭ nedevidan objekton, tiamaniere helpante la edukon de novaj generacioj en spirito de toleremo kaj respekto al aliaj nacioj;

4. Atentigi ĉiujn internaciajn organizaĵojn kaj aparte la Unuiĝintajn Naciojn pri la internacia lingvo ne nur kiel necesa kaj ĉiuflanke perfekta teknika komunikilo de pensa interŝanĝo (radio, kunvenoj, konferencoj, kongresoj, filmoj, scienco, arto, k.t.p.) sed ankaŭ kiel potenca rimedo por proksimigo de la popoloj kaj, sekve, ankaŭ por la akcelo de justa, daŭra mondpaco."

S-ro Malmgren raportas pri la longa kaj laciga laboro de la Komitato kaj Estraro kaj citas inter la plej gravaj traktaĵoj :

1. U.E.A. aranĝos pri eldono de serio de libroj, enhavantaj la prelegojn de la Someraj Universitatoj, kaj tiu serio komenciĝu per la prelegoj de la nuna kongreso.
2. U.E.A. akceptis la principon, ke—por faciligi la laboron de la kongresaranĝantoj—la aliĝoj al la kongreso devas alveni plej malfrue la 1-an de Julio.
3. La Norvega Esperantista Ligo proponis, ke la norvega ĉefdelegito—S-ro Ragnvald Rian—kiu prizorgis la ĉefdelegitecon en Norvegujo dum 10 jaroj kaj cetere faris al nia movado tre merititan, kaj dum la milito cetere danĝeran laboron por Esperanto, estu distingata per Honora Membreco. La Komitato unuanime decidis elekti S-ron Rian Honora Membro de U.E.A.
4. La komisiito de U.E.A. por UNESCO-aferoj, S-ro E. D. Durrant, Londono, prezentis detalan raporton pri la traktado de la demando pri internacia lingvo ĉe UNESCO, el kiu raporto evidentiĝas, ke UNESCO estas preta objekte studi la kvalitojn de Esperanto kiel internacia lingvo.
5. La Komitato de U.E.A. ricevis raporton pri enketo pri internacia lingvo, faritan de eksdir. Prof. Pierre Bovet por la Instituto J. J. Rousseau en Genevo. Ĉar tiu raporto estas konsiderata kiel grava por la diverslandaj Esperantistoj, la Komitato komisiis al L.K.K. en Malmö presigi tiun raporton.
6. Alia interesa raporto de la Asocio de svisaj gimnaziaj instruistoj estos multobligata de la Centra Oficejo de U.E.A. por posta transsendo al la aliĝintaj landaj asocioj.
7. La komisiono por pristudi la eblecojn plibonigi nian gazeton prezentis—parte sur bazo de proponoj de la redaktoro Hans Jakob—raporton kun diversaj sugestoj, kiujn akceptis la Komitato. La komisiono ankaŭ rekomendas al ĉiuj aliĝintaj landaj asocioj elekti personon, kiu agu kiel

respondeca help-redaktoro por la koncerna lando.


8. Sur bazo de raporto de la komisiono por pristudi la taktikajn metodojn unuecigi la penadojn oficialigi Esperanton, la Komitato decidis direkti rekomendon al ĉiuj landaj asocioj iniciati la aranĝon de kursoj por la instruistaro, prefere kun monsubteno de la ŝtatoj.
9. La Komitato rajtigis al la Estraro—laŭ la kapablo de nia asocio—doni ekonomian helpon al Islando, se tio estos bezonata, por aranĝi Esperanto-kursojn por la geinstruistoj tie.
10. La Komitato decidis komisi al la asocio de la geinstruistoj, Internacia Instruista Kunlaboro, la gravan taskon kolekti faktojn rilate al la instruado de Esperanto en lernejoj ĉiuspecaj, por ke tiuj faktoj povu esti disponeblaj al kursaranĝantoj kaj servi en la propagando.
11. La Komitato decidis krei propagandan centron, kaj esprimis la deziron kaj esperon, ke S-ro Strönné, nia kongresa prezidanto, fariĝu estro de tiu centro. Bedaŭrinde, li ankoraŭ ne promesis. Tiu centro havos la taskon dissendi praktikajn proponojn pri propagandmetodoj. Speciale grave estas iniciati okazigon de Esperanto-semajnoj en ĉiuj landoj antaŭ la komenco de la studsezono, dum kiu semajno oni faru intensan reklamon por Esperanto. Aliaj gravaj aranĝoj estas : kreo de internacia gazetara servo kaj de *fluganta ekspozicio*. Cetere grave—eltrovo de rimedoj por kolekti aŭ havigi monon por la propagando. La propaganda centro akceptos ĉiujn proponojn de la Esperantistoj koncerne la propagandon, sed oni ŝatos, ke ĉiu kiu ensendos proponon, samtempe indikos kiamaniere havigi monon por la efektivigo de la propono.
12. Laŭ rekomendo de la 3-a laborkunsido la Komitato decidis akcepti la proponon, ke U.E.A. instigu la landajn Esperanto-federaciojn, aŭ en propra reĝimo aŭ pere de alia Esperanto-organizaĵo, aranĝi internaciajn klerigajn kaj sciencajn kursojn en Esperanto.
13. La Komitato decidis principe—laŭ la eblecoj de la koncernaj kongresurboj—okazigi internaciajn konkursojn okaze de la universalaj kongresoj. Estu du specoj de konkurso : unu speco koncernas literaturon kaj reklamilojn ; alia speco koncernas popoldancojn, orator- kaj kant-kursojn. La Komitato elektis S-ron Vilho Setälä por la tasko starigi regularon pri la Konkursoj.

14. La Komitato faris la deziresprimon, ke estontece la kursoj en Helsingör, por plioficialigi ilin, okazu sub la auspicoj de U.E.A. kaj ke ankaŭ aliloke samspecaj kursoj estu aranĝotaj de landaj asocioj aŭ de aliaj kompetentaj instancoj post aprobo de U.E.A.
15. La Komitato proponas al aliaj mondorganizaĵoj kunlabori, rilate al la internacia propagando, per reciproka informado pri aranĝoj, kiujn la koncernaj mondorganizaĵoj decidis efektiviĝi.

Sekvas dankesprimoj. D-ro Lapenna dankas en la nomo de eksterlandaj kongresanoj; S-ro Strönne en nomo de L.K.K. dankas ĉiun unuopulon, kiu siaparte helpis al la sukceso de la kongreso, kaj precipe la gazetaron de Malmö; S-ro Malmgren dankas en la nomo de U.E.A. kiel ĝia prezidanto, la kongresan komitaton, antaŭ ĉio la prezidanton S-ron Strönne. Eksonas *La Espero* kaj ĝiaj tonoj jam perdiĝas en la foran atmosferon. . . . La Kongreso estas finita. La ĉefurbo de Esperantujo diseriĝas. Kiu veturas al Kopenhago, kiu al Stokholmo?

Restas nur la kortuŝa, profunda sento de travivita grava laborkongreso, kies decidoj iam plene efektivigitaj kondukos nin al la sopirata celo, ĉe kiu la bela sonĝo de homaro efektiviĝos.

Vilho Setälä



S-ro Jan Strönne
S-roj Oliver, Malmgren, kaj Goldsmith

Germanujo

Sesdek procento de la deputitoj en la Bavara parlamento voĉdonis favore al Esperanto. Petskribo esprimanta la deziron ke oni akceptos Esperanton kiel la internacian lingvon estas subskribita de membroj de ĉiuj partioj kaj estas sendata al U.N.

Laŭ raporto en la usonzona gazeto Stars and Stripes

Post la 33-a

La 33-a Universala Kongreso de Esperanto estas for. Ne apartenas al mi la tasko prijuĝi la kongreson, sed kiel prezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio mi ĝojas, ke Svedujo havis okazon akcepti la tutmondan gesamideanaron. Dum multaj jaroj Klubo Esperantista de Malmö estis unu el la plej grandaj kaj altrangaj kluboj de nia lando, kaj la tasko elekti Lokan Kongresan Komitaton estis iuspeca kroniĝo de longedaŭra laboro. La internacia situacio ne estis la plej bona por la kongreso, kaj la vizaj-devizaj malfacilaĵoj kreis grandan kromlaboron. Ni tamen faris nian plejblon, kaj se ni pere de nia laboro povis servi kaj helpi al la tutmonda esperantista movado, tio donos al ni sufiĉan rekompencan.

Nun kiam la kongreso estas for, ni tutsimple konstatu, ke ni devas daŭrigi la laboron streĉante ĉiujn eblajn fortojn. La kongreso en Bern signifis la unuan renkontiĝon post longa paŭzo. La kongreso en Malmö estis la unua paŝo survoje al renaskiĝo. La grandaj malfacilaĵoj, kiuj daŭre ekzistas por interŝtata vivo, ne permesas, ke la esperantistoj laŭvole kaj libere havu rektan kontakton unu kun la alia. Sed nia tasko ja estas fari nian plejblon, ĉiu en sia loko, por tiamaniere kontribui al la antaŭenmarŝo.

Neniam antaŭe la mondo tiel klare kaj bone komprenis la bezonon de tutmonda helplingvo. Ni devas eluzi la situacion, kaj ĉiu esperantisto havas sian gravan taskon. Vi mem iamaniere serĉu ĝin. Vi mem trovu ĝin ie en la mondo, kaj vi mem plenumu ĝin. Konstante ni semu.

Ke Svedujo kaj Malmö pere de la 33-a povis doni sian kontribuon al la tutmonda antaŭenmarŝo kaj al la renaskiĝo de forta, celkonscia esperantomovado, tio estas por la sveda movado fonto de ĝojo kaj kontentiĝo. Niaflanke, ni daŭrigos la laboron jam faritan. La movado atendas, ke ni ĉiuj laboru. Kune ni agu!

Jan Strönne

Plendo

Morto! Estas viv' finita!
Kie estas do feliĉo?
Kie—gloro atendita?
Restos mia korp' dediĉo
Nur al vermoj, al putrado,
La animo bona, saĝa
Estos er' de l' neestado!
Kaj severa kaj sovaĝa
Profitema societo
Ekforĝesos min por ĉiam,
Kaj eĉ ĝemo, eĉ larmeto
Rememoros min neniam . . .

M. Soloviev

34a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bournemouth, Anglujo, 6-13 Aŭgusto, 1949

UNUA INFORMILO

Loka Kongresa Komitato : *Prezidanto*, J. W. Chambers ; *Vicprezidanto*, R. Porter ; *Ĝenerala sekretario*, C. C. Goldsmith ; *Konstanta sekretario*, O. T. Nicolaisen ; *Komitatanoj*, W. Birtwistle, F-ino G. E. Cock, A. Fisher, F-ino M. Gray, S-ino W. Laurie, S-ino F. W. White.

Adreso por leteroj : 34a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Kongresejo : La Urbodomo, Bournemouth. La Malferma Kunsido kaj la Balo okazos en La Pavilono.

Kongreskotizo :		ĝis	ĝis	
		31-12-48	31-3-49	poste
Kongresano	ŝil.	30	35	40
Edzo aŭ edzino				
de kongresano	ŝil.	15	17.50	20
Junul(in)o ne				
pli ol 20-jara	ŝil.	12.50	15	20

(vidu ankaŭ la duan paĝon de la kovrilo)

Pagoj : Estas akceptataj

- ĉiuj pagiloj ŝanĝeblaj en bankoj. Atentu : ne sendu monbiletojn en letero !
- internaciaj poŝtmandatoj, ĉekoj, k.t.p. pageblaj al Universala Esperanto-Asocio.
- Oni pagu al iu banko petante ke la sumo estu sendota al Barclays Bank Ltd., Rickmansworth, konto de Universala Esperanto-Asocio, kaj kun sciigo pri la sendinto.

Kiel pagon por la kongreskotizo ni ne akceptas poŝtmarkojn aŭ varojn, sed ni povas akcepti ĝuste stampitajn internaciajn respondkuponojn laŭ la tarifo 4 rpk. = 1 ŝil.

Aliĝiloj : haveblaj ĉe UEA kaj ĉe la landaj asocioj. Aliĝilo validas nur kun samtempa pago. Skribu la nomon kaj adreson tre klare, prefere per literoj similaj al la presitaj.

Kongreskarto : Tuj post ricevo de la aliĝilo kaj kotizo, LKK sendos al vi provizoran kongreskarton. Pli poste kongresanoj ricevos informojn kaj mendilojn por loĝejoj kaj ekskursoj.

Al informpetoj bonvolu aldoni internacian respondkuponon (Britoj, poŝtmarkon).

Glumarkoj : Mendu kaj uzu la belajn kongresajn glumarkojn. Por 6p. aŭ du rpk. oni ricevos folion da 20 glumarkoj.

Blinduloj : Konforme al la kongresregularo de UEA, blindulo kaj lia gvidanto ricevos senpagan kongreskarton ĝis la fino de Marto 1949 ; poste li devos pagi la duonon de la plena kongreskotizo.

La aliĝilo de blindulo devas esti subskribita de blindula organizaĵo, aŭ de okulkuracisto.

Blindula kaso : Helpu ebligi al blinduloj la kongresviziton ; la komitato antaŭdanke akceptas donacojn por tiu kaso.

Fakkunsidoj : Tiuj, kiuj volas aranĝi fakkunsidojn, estas petataj sendi informojn al ni kiel eble plej frue, kun indiko pri la probabla nombro da ĉeestantoj.

Loĝejoj : pri tiuj ni donos informon en estonta *Informilo*, sed ni povas nun sciigi ke bonaj loĝejoj, estos haveblaj po £5, £6, £7, £8, kaj pli altaj sumoj por la semajno. Tiuj prezoj enhavas la koston de ĉiuj manĝoj dum la semajno, sed ne la trinkmonon. Ni esperas ankaŭ aranĝi pri malmultekostaj loĝejoj kaj tendaro. Notu, ke pro la specialaj cirkonstancoj en Bournemouth (feria urbo) ni kutime povos akcepti mendojn por restado nur de sabato ĝis sabato, t.e. por unu, aŭ du, aŭ pli da semajnoj.

Aliĝoj : ĝis la 27a de Aŭgusto aliĝis 135 kongresanoj.

GAJA LEGANTO PER ESPERANTO

de P. E. SCHWERIN

Spritaĵoj – Vortludoj
Preseraroj – Anekdotoj
Matematikaĵoj – Rimaĵoj
Societludoj – Demandaro
Konsiloj por Grupestroj
kaj Kursgvidantoj.

Prezo :

1 ŝil. 3 pencoj, aŭfranko 1p.
aŭ 5 int. rpk. aŭfrankite.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.
Mendu ĉe U.E.A.

LA PETSKRIBO

Landoj

Germanujo ..	4,920,179	Hungarujo ..	6,160
Ĉeĥoslovakujo ..	1,032,936	Urugvajo ..	4,704
Nederlando ..	547,118	Portugalujo ..	3,562
Norvegujo ..	490,382	Aŭstralio ..	3,370
Brazilo ..	169,446	Novzelando ..	2,540
Aŭstrujo ..	113,333	Svisujo ..	2,476
Francujo ..	95,809	Egiptujo ..	2,302
Svedujo ..	46,380	Grekujo ..	1,513
Belgujo ..	29,823	Maroko ..	1,330
Islando ..	28,348	Palestino ..	531
Britujo ..	27,912	Irlando ..	463
Bulgarujo ..	21,992	Kanado ..	399
Jugoslavujo ..	14,138	Sud-Afriko ..	295
Italujo ..	13,202	Hispanujo ..	276
Polujo ..	9,721	Hindujo ..	253
Danujo ..	9,111	Ceteraj lokoj ..	771
Usono ..	8,531		
Finnujo ..	6,390	sumo ..	7,621,944
Argentino ..	6,248		

Okupoj

Artistoj ..	2,138	Navigaciistoj ..	1,138
Delegitoj Komunumaj	521	Parlamentanoj ..	258
Dentistoj ..	585	Policistoj ..	2,371
Desegnistoj ..	2,163	Presistoj ..	3,317
Dommastrinoj ..	45,826	P.T.T.-istoj ..	25,042
Edukaj Aŭtoritatuloj	1,171	Religiistoj ..	1,544
Elektristoj ..	3,087	Sciencistoj ..	1,214
Farmaciistoj ..	1,334	Sindikatĉefoj ..	466
Farmistoj ..	10,685	Soldatoj ..	3,378
Hotelistoj ..	1,771	Studentoj ..	33,727
Inĝenieroj ..	13,977	Ŝoforoj ..	2,379
Instruistoj ..	33,627	Ŝtatoficistoj ..	33,094
Juristoj ..	1,790	Teksistoj ..	1,385
Jurnalistoj ..	1,212	Transportistoj ..	382,990
Komercistoj ..	59,501	Urboficistoj ..	3,770
Konstruistoj ..	6,489	Vendistoj ..	9,276
Kuracistoj ..	4,526	Vestistoj ..	6,299
Laboristoj ..	31,222	Diversaj ..	6,864,037
Lingvistoj ..	1,538		
Metiistoj Diversaj	23,096	sumo ..	7,621,944

Kolektivoj ricevataj dum la pasintaj 2 monatoj :

Touristverein "Die Naturfreund", Nürnberg,	
Germanujo	23,042
Vorsitzender der Arbeitsgemeinschaft deutscher	
Eisenbahnfachschulen, Köln, Germanujo	25,000
Allgemeiner Gewerkschaftsbund, Ortskartell	
Bingel, Germanujo	2,800
U.Z.W.D., Jeugverbodering, Brussel, Belgujo	3,000
Oficistoj de la Préfecture de la Seine, Francujo	25,216
Union Departementale des Syndicats Confederes,	
Force Ouvrière, de Maine-et-Loire, Angers,	
Francujo	8,500
Bayerischer Gewerks.-Bund, (Landa Organizaĵo)	
Germanujo	47,278
Deutsches Gewerkschafts Bundes, Distrikto	
Niedersachsen, Germanujo	1,906,347
Gewerkschaftsbund Württemberg-Baden,	
Germanujo	400,000
Ortsausschuss der Gewerkschaften, Franca Zono,	
Germanujo	360,000
Socialdemokrata Partio de Germanujo, Hessen-	
Sud, Germanujo	58,621

T.V. "Die Naturfreund", Vieno, Aŭstrujo ..	82,500
Freie Schule "Kinderfreunde", Landesleitung	
Steiermark, Aŭstrujo	14,000
Nederlands Verbond van Vakverenigingen,	
Nederlando	343,534
Oficejo "Esperanto ĉe la Instruado", Nederlando	150,524
Svenska Freds- och Skiljedomsföreningen,	
Stockholm, Svedujo	12,000
Federacion Uruguaya del Magisterio,	
Montevideo, Urugvajo	4,000
Svenska Postmannaförbundet, Stockholm,	
Svedujo	16,000
Sumo de ĉiuj kolektivaj subskriboj ĝis 9/8/1948 :	6,757,572

Ankoraŭ pri supersignitaj literoj

En cirkulero pri reformoj oni asertas: "La enkonduko de Esperanto kostus ses novajn klavojn al ĉiuj kompostmaŝinoj en la mondo, sed enkonduko de novaj klavoj malfaciligas la kompostadon". Kiel fakano pri maŝinkompostado mi vere ridis pri ĉi tiu aserto. Se efektive la sorto de Esperanto dependus de ses novaj klavoj al ĉiuj kompostmaŝinoj, ni pli bone povus ĉesi nian strebadon por Esperanto, ĉar teknike *ĉi tiu aldono de ses klavoj neblas*. La fabrikisto de kompostmaŝinoj devus konstrui tute novajn maŝinojn !

Tio, kion la presejoj, kiuj havas kompostmaŝinojn, bezonas por komposti per ili Esperanto-tekstojn, estas nur **matricoj** kun niaj ses supersignitaj literoj. La kosto de tiuj matricoj ne estas tre alta kaj ili fariĝos des pli malaltaj ju pli da presejoj aĉetas ilin.

La matricoj estas tenataj en ujo konsistanta el kanaloj. Ĉiu litero (matrico) havas sian propran kanalon. Necesas atenti nur, ke ankaŭ niaj supersignitaj literoj havu sian kanalon. Por atingi tion, la presisto bezonas nur fajlilon kaj iom da kompreno. Ambaŭ li havas. Lia metodo estas, eligi el ĝia kanalo ĉiun literon kiu ne troviĝas en Esperanto kaj ilin anstataŭigi per la supersignitaj. Kompostisto, kiu kutime kompostas germanajn tekstojn eligus: ä, ö, ü, w, y, x; franca kompostisto eligus: é, ê, ç, k.s. Kiam la Esperanta teksto estas kompostita oni simple ŝanĝas la matricojn. Tiamaniere oni povas transiri de unu lingvo al alia kaj la ŝanĝo okupas tri aŭ kvar minutojn ! Aldono de novaj klavoj neblas kaj nenecesas.

Mi esperas, ke mi sukcesis komprenigi la aferon al vi.

H. Schoonenberg, Amsterdam
(laŭ artikolo en Ukraina Esperantisto)

NORD-AMERIKO

La Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko okazigis sian 38-an Kongreson en Toronto, Kanado, 2-5 Julion sub prezido de D-ro W. Solzbacher, Vicprezidanto de la asocio. La raporto de la Ĝenerala Sekretario, G. A. Connor, montris ke je 1-a de Junio EANA havis 743 membrojn, inter ili 70 en Kanado.

Du radiostacioj okazigis intervjuojn kun Ges-roj Connor pri Esperanto. Multaj ĵurnaloj, ne nur en Toronto, sed ĉie en Kanado kaj Usono, enhavis raportojn. Granda magazeno, *T. Eaton*, la tria en la mondo laŭ grandeco, presigis urbplanojn kun saluto al la Esperanto-Kongreso.

Kontrolisto (Vicurbestro) Roelofson salutis nome de la urbo kaj la Urbestro en publika kunveno, kiu okazis en la Universitato sub prezido de F-ino Olive Latimer, Prezidentino de la Esperanto-Klubo de Toronto. D-ro Solzbacher prelegis pri la lingva problemo en la internacia vivo, precipe en la Unuigitaj Nacioj, kaj pri la praktika utileco de Esperanto. S-ro Connor klarigis la organizon kaj la servojn de la Esperanto-movado. S-ino Doris Connor faris treege efikan provlecionon laŭ la Cseh-metodo. La vespero finiĝis per vigla kaj interesa demando-kaj-respondo-periodo. Bulgara samideano, S-ro Vasilov, rakontis pri siaj personaj spertoj, kiam li venis al Toronto, nesciante la anglan lingvon, kaj kiam Esperanto helpis lin en lia nova hejmlando, Kanado. Dum la publika kunveno oni prezentis unuafoje tute novan kaj modernan libron *Esperanto: The World Interlanguage* (Esperanto: La Monda Interlingvo) kiu ĵus aperis en grava eldonejo en New York kaj kiun verkis Ges-roj Connor, D-ro Solzbacher kaj Pastro Kao (el Ĉinujo). La libro tiom plaĉis al Toronto, ke ĉiuj disponeblaj ekzempleroj tuj disvendiĝis.

Dum la 5 aferkunvenoj viglaj, kaj kelkfoje akraj, diskutoj okazis pri la emo de multaj Esperantistoj fondi novajn gazetojn, bultenojn, institutojn, libroservojn k.t.p. Oni voĉdonis por rezolucio bedaŭranta tion kaj esprimanta la konvinkon, ke estas necese subteni bone funkciantan kaj efikan Centran Oficejon.

Bankedo sub prezido de S-ro Robert Kelly kaj kun paroladoj de S-ino D. Connor kaj Pastro R. Edis Fairbairn, Tutesperanta Vespero kun teatraĵeto, kaj prelego de S-ro W. P. Vathis pri la Esperanto-literaturo, kaj ekskurso al la vidindaĵoj de la urbo, estis aliaj sukcesaj aranĝoj de la Kongreso.

W.S.

ESPERANTO KAJ RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 120, Heronsgate Road, Chorleywood, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri tiu rubriko

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	15.30-15.45	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I.
	17.15-17.30	Paris. 41.21m. Radio-diffusion Francaise, Emissions espérantistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
	21.00-21.15	Praha. 31.41m. P.
Lundo	11.30-11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	17.30-17.40	Wien II. 31m., 41m. kaj 228.6m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	20.50-21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraĵscenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	21.00-21.30	Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo. (Nur la unuan London de la monato).
Mardo	23.30-23.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.
	18.05-18.10	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Neugasse 28, Bern.
	18.50-19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	20.45-21.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	21.00-21.10	Ostrava. 259m. Radiostacio. Ostrava, Bráfova 5 (krom la unua mardo de la monato).
Merkredo	10.15-10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10-21.25	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
	23.30-23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Ĵaŭdo	17.45-18.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očeky vysilač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	18.05-18.10	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.
	20.50-21.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
	21.00-21.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	18.50-19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	23.30-23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Sabato	12.00-12.15	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan sabaton). RadioMünchen, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München Bayern, Germanujo.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

KUDRA KAJ TRIKA TERMINARO

M. kaj V. Verda

9 pencoj aŭ 3 respondkuponoj

Mendu ĉe U.E.A.

Talenta hungara samideano

Kiam li estis duĵara infano Imre Ungar fariĝis blinda post malsano. Sed kiel ofte okazas en tiaj cirkonstancoj, liaj muziksentoj pliakriĝis kaj baldaŭ montriĝis, ke li estis bonega pianisto.

Post la unua mondmilito, kiam li estis dekjaraĝa, li ekaŭdis la sonojn de la lingvo de la espero kaj fariĝis Esperantisto. Kiam li maturiĝis kaj jam estis vera sed malmulte konata pianisto, en Varsovio en 1932 estis aranĝata internacia Chopin-konkurso por pianistoj de ĉiuj landoj. Varsoviaj Esperantistoj baldaŭ eksciis, ke inter multaj alilandaj (eĉ japanaj) gepianistoj, venis en la polan ĉefurbon bonega Esperantisto—blinda hungara samideano, Imre Ungar. Nia varsovia samideanaro zorgeme gastigis la estontan laŭreaton de la konkurso.

La konkursa juĝantaro decidis, ke du pianistoj egale meritis ricevi la unuan premion, sed ĉar ĝi ne povis esti dividata, la varsoviaj opiniis, ke la alia kandidato, vidanto, devus cedi la unuan lokon al nia blinda samideano. Sed la rivalo ne estis tiom grandanima kaj la juĝantaro decidis lotumi la unuan premion inter la du kandidatoj. La sorto decidis, ke Imre Ungar malgajnu. La varsoviaj tamen ne ĉesis opinii, ke li estis la venkinto, kaj vere, de tiu tempo la nomo de Ungar komencis esti fama en Eŭropo.

Venis kaj pasis la dua terura mondmilito.

En la nuna jaro la polaj samideanoj—nemultaj restas el tiu unua tempo—eksciis, ke Imre Ungar denove vizitas ilian landon. Liaj koncertoj havis grandegan sukceson, sed por ni varsoviaj Esperantistoj estis duoble agrable saluti lin kiel nian bonegan samideanon.

Post unu el liaj koncertoj la ĉefdelegito de U.E.A. salutis la artiston en la nomo de nia universala asocio, kiel ĝian anon, kaj flanke de la koncert-aranĝintoj estis petata helpi kiel interpretisto dum la solena vespermanĝo, kiun aranĝis reprezentantoj de la pola muzikistaro. Tial ke nia pola ĉefdelegito ne povis preterlasi la okazon propagandi nian lingvon, li do dum la vespermanĝo faris salutparoladon en Esperanto substrekante, ke se li, kiel profesia advokato plejparte multe parolas por malmulton diri, li nun havas multon por diri en malmultaj sed koraj vortoj.

Nia fama samideano sincere dankis, promesante veni Polujon venontan jaron kiam denove estos aranĝita Chopin-konkurso de pianistoj. Sed antaŭ ol forveturi Imre Ungar per la radio-ondoj de Pola Radio, en sia flua Esperanto adiaŭis la polan Esperantistaron.

Dankon, kara samideano, kaj granda poeto de sono, pro via vizito kaj ĝis revido en la venonto jaro.

RoSo

Ekspozicio de Infanaj Desegnoj

De 23-a de Majo ĝis 13-a de Junio 1948 okazis en Lyon, Francujo, Internacia Ekspozicio de Infanaj Desegnoj organizita de la Lyon-a Esperanto-Societo. Pli ol 3000 desegnoj estis kolektitaj en la tuta mondo danke al la helpo de la delegitoj de U.E.A.

La ekspozicio, patronita de la urbestro S-ro Herriot, de la prefekto, de la Universitata rektoro, kaj de la ĉefaj urbaj aŭtoritatoj, okazis en la belegaj festsalonoj de la Lyon-a Urbdomo.

Mil afiŝoj prezentitaj en la montrofenestroj de la butikoj en la urba centro, artikoloj en la gazetoj kaj radioparoladoj anoncis la Ekspozicion. Du grandaj ŝildoj estis metitaj ambaŭflanken de la Urbdomo kaj altiris la atenton de la multaj preterpasantoj dum la tuta daŭro de la Ekspozicio. Ĉiuj direktoroj de lernejoj en Lyon kaj ĉirkaŭaĵo ricevis inviton organizi grupvizitojn de lernantoj kondukataj de instruisto, kun senpaga eniro.

Ĉe la solena malfermo, persone ĉeestis multaj aŭtoritatoj, inter ili la rektoro de la Universitato, la prezidanto de la *Syndicat d'Initiative* (turisma oficejo), unu vicurbestro, la konsuloj de Belgujo, Nederlando kaj Svedujo, k.a.

La ekspozicio ricevis multajn vizitantojn. Raportoj tre favoraj aperis en la Lyon-aj gazetoj aŭ estis dissendataj de la radiostacio. Prezento de Esperantaj dokumentoj, kun vendado de libroj kaj propagandiloj kompletigis la ekspozicion.


Nun la tuta desegna materialo estas je la dispono de aliaj Esperanto-societoj, kiuj deziras organizi similan ekspozicion. La desegnoj estos sendataj senpage, sed la societo, kiu ricevos ilin, devos post sia propra ekspozicio, siavice resendi la desegnojn al la sekvonta societo kaj pagi la transporton. Por informoj, oni sin turnu al Richard Levin, 55 Avenue Félix-Faure, LYON, Francujo.

Polujo

La Ministerio de Klerigo en Varsovio informas per cirkulero, ke dum la jaro oni instruis Esperanton kiel nedevigan studobjekton en ok lernejoj de Krakow inkluzive de universitato. La kursojn gvidis Prof. Sygnarski, kiu krome gvidis kursojn por skoltaj, poŝtistoj (kun partopreno de la poŝta fakestro kaj edzino) kaj kurson por gejunuloj partoprenontaj laborbrigadojn en Bulgarujo. Multaj el la lernantoj faris specialan ekzamenon—skriban kaj parolan—pri kiu oni donis konforman ateston pri lingvo-kapablo.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe U.E.A.



***Morto de Trajno**, detektiv-romano de Freeman Wills Crofts; el la angla lingvo tradukita de Mason Stuttard. 256p. Prezo, bindita, 9 ŝil. afranko 6p. Eld. The Esperanto Publishing Company Ltd.

Inter la tro elektemaj delikatuloj, kiuj pli-malpli hipokrite afektas malŝati la detektivromanon, pretekstante ke ĉi tiuj ne estas specimenoj de *alta literaturo*, certe ne mi staras. Altan literaturon mi tre amas kaj eĉ, laŭ mia supozo, kapablas ŝati; tamen, tio ne malhelpis kaj ne malhelpas, ke al detektivromanoj mi dediĉu iom grandan parton da miaj horoj de legado. Kaj mi ne opinias ke tiajn horojn mi vane perdadis. Kompreneble, el tiaj romanoj ne ĉiuj indas ŝaton aŭ simple atenton. Multenombraj ja estas la *naĵoj* en tiu fako de la literatura ĝardeno, kiuj ne meritas eĉ dumvojaĝan foliumadon. Sed, kiam temas pri verkoj de majstroj-specialistoj, kiaj Agatha Christie (en ŝia *bona epoko*), Dorothy Sayers, George Simenon, Peter Cheney aŭ Freeman Wills Crofts, estas tute alia afero. Tiam estas demando ne pri murdrakonto, nek pri ĉasado al krimulo tede trolongigita, sed pri priskribo de lokoj, kaj ties etoso, kompono de karakteroj, psikologiaj problemoj, sociaj interrilatoj, disvolviĝo de logika meditado, k.t.p. Tiaj romanoj egalvaloras pli pretendemajn verkojn, ilin eĉ superas pro la *spicaĵo* el eltrovota enigmo. Tial mi senrezerve laŭdas *The Esperanto Publishing Co. Ltd.* car ĝi eldonis en Esperanta vesto la nun priparolatan verkon, kaj ĝin varme gratulas, ĉar ĝi elektis kiel tradukonton tian lerte spertan Esperantiston, kia Mason Stuttard.

Kredeble, mi ne bezonas insisti pri la talento de F. W. Crofts (nia malnova samideano); ĉiuj legintoj de verkoj, kiaj *Dramo sur la insulo Wight* aŭ *Homo en maron!*, tiun talenton rekonas kaj alte taksas. Pri Mason Stuttard kaj ties majstra manumado de nia lingvo ja respondas *La Virineto en bluo*, kies originala aŭtoro li estas. Post tiu lasta verko, neniu kontestas, ke Mason Stuttard estas unuaranga stilisto. . . .

Jen pri la principo. Nun restas le nemalgrava demando pri la realigo. Mi tuj diros, ke *Morto de Trajno* ne aparte pompas inter la aliaj verkoj de la sama aŭtoro. Al ĝi ĉefe mankas unueco. Dum la unua parto—laŭ mi la pli valora kaj

interesa—rakontas kun plej teknikaj kaj fakaj detaloj la diversajn ĵongladojn, kiujn dum la milito necesigis formado kaj ekirigo de vagonaro ŝargita per taktikaj valoraĵoj, la dua priskribas kun iom tro da vanta zorgemo la serĉrimedojn uzatajn de la polico kaj la fazojn de ties enketo. Krome, ĉar temas pri spionada okazintaĵo, kaj ĉar la agado disvolviĝas dum la unuaj jaroj de la milito, precize kiam Rommel plagis en Libio, la kulpuloj pri la *morto de la trajno* estas krom unu germanaj spionoj, kiuj en la romano ludas nur la rolon de *deus ex machina* (dio malsupren veninta per maŝino). Tamen, estas juste diri, ke en tiu dua parto la leganton ne malmulte interesas la penetremo kaj elturniĝemo de la famekonata inspektoro French.

Kaj nun, kion pri la traduko? Kompreneble, ĝi estas bonega, tute tia, kian ni rajtas atendi de Mason Stuttard. En sia antaŭparolo la tradukinto diras, ke li decidis “redoni la originalajn pensformojn en kiel eble plej simpla kaj klara lingvo kaj efektiviĝi tion per rezigno pri la komplikaj partecipo-konstruoj, per maksimuma uzo de simplaj verbformoj kaj konservi la originalan sintakson kaj la pasivecon per frazinversigo.” Kaj tiel estas. Kaj tial la tuta lingvaĵo en la verko estas senripoĉa . . . aŭ preskaŭ. Ĉar, ho ve! absoluta perfekteco ne ekzistas sur tero, absoluta perfekteco estas nehoma. . . .

Do, en la traduko (tamen modela) de Mason Stuttard troviĝas kelkaj malglataĵoj. Certaj el ili devenas de preseraroj. La aliaj povas ĝeni nur prilingvajn maniulojn. Tamen, mia recenzista honesteco ordonas, ke ilin mi ne prisilentu. Tial mi tuj faros du-tri rimarkojn.

La tradukinto emas skribi (kaj tion li faris tre, tro ofte) *telefoni iun* anstataŭ la kutima, logika esprimo *telefoni al iu*. Ĉu li tolerus *skribi iun*? Certe ne. Tamen samas. Tre, tro ofte li uzis *implici* en la senco de la oficiala *impliki*; li uzis *fabrikejo* kaj *bagatelaĵo* anstataŭ *fabriko* kaj *bagatelo*. Nur hazarde mi scias, ke *stenpafilo* estas ia simpligita pafmaŝino inventita de iu S-ro Sten: sed kio estas *frejtportisto*? Tion mi ne sukcesis ekscii pro manko de piednoto. Mi strabis ankaŭ al *ekskluziva barbiro* kaj al *ekelvenadis*, kiujn analizi ne prosperis al mi. Sed pri tio, sendube kulpas nur mia malklereco. . . .

Jen la tuta, aŭ preskaŭ tuta rikolto. Kiel oni vidas, ĝi estas neabunda kaj neniel povas ŝanĝi mian opinion pri la intereso de la verko mem kaj pri la ĝenerala kaj plaĉa pureco de la traduka lingvaĵo.

Georges Avril

***Johano la brava** de Sándor Petöfi. Trad. el la hungara K. Kalocsay. Eld. Literatura Mondo, Budapest 1948, dua eldono, 65 p. 16×12 cm. Kartonita ; prezo 4ŝ. 6p., afranko 3p.

En la kutima vesto de la tipoj de L.M. la naiva epopeeto de Petöfi duan fojon aperas en Esperanto per la majstro plumo de Kalocsay. Ĝojige estas, kiel rimarkigas la tradukinto mem en la nelonga antaŭparolo, ke duan eldonon de poezia verko postulas la publiko. Kaj ĉi tiu verko estas nobla kontribuo de hungara Esperantismo al la festoj de la centjara datreveno de la hungara revolucio, kies kungvidanto Petöfi estis. La stilo de Kalocsay jam estas tro konata por bezoni prilaŭdon de mi. La ritmo lulanta, kiel popola muziko, lasas supozi ekstremam fidelecon al la originala teksto ; la manko de artefare kunmetitaj vortoj (kutimaj pekoj de niaj poetoj, kaj pro kio oni ĝenerale devas tiom peni por kompreni Esperantan poemon . . .) estas unu el la ĉefaj ŝatindaĵoj, kaj versajne unu el la ĉefaj kaŭzoj de la favoro, kiun la libro trafis jam en la unua eldono, ĉar la leganto, allogate de la simpleco, povas allasi sin al la ritmo kaj ĉarmo de la popolfabelo. Mi ne rakontu la fabelon mem, nek kiel Janĉi, tra ĉiuspecaj danĝeroj kaj aventuroj, fine sukcesas revivigi sian mortintan fianĉinon Ilnjon kaj porĉiame restadi kun ŝi en felando. . . . La sorĉo de la verko ne estas en la temo, sed en la detaloj : sunsubiroj kaj tagiĝoj super hungara stepo, mirindaĵoj kaj mirakloj en fremdaj landoj graciplene miskonataj (ekz. Italujo eterne glacia, Francujo limtuŝanta Hindujon ! k.s.), dum sur strangaj fonoj, en groteskaj kadroj, ĉiam samas la homa sentaro.

Preseraroj estas malmultaj (*poezio kredo* anst. *poezia* p.3 ; transmeto de versoj p.22, dua strofo, p.46 kvara strofo).

Se oni rajtas kritiki koloson kia Kalocsay, mi aldonu, ke mi ne ŝatas la diftongan konsideron de kelkaj vortoj : p.32 *kuiristo* (kvazaŭ kŭiristo), p.33 *kruele*. Stranga estas la uzo de *per* (*per la steloj* anst. *pro* p.65) kaj de *ke* anst. *tiel ke* p.55.

Majstra estas la regado de la parenkrimoj. Pri la neologismoj—cetere malmultaj—la batalo ankoraŭ ardas !

C. Conterno

Prospekto de la Filmstrioj : Interesa prospekto pri la entrepreno Esperanto Film-Grupo. Donas ĉiujn informojn pri la fondo, celoj, eldonaĵoj, prezoj kaj pagmanieroj. Oni sin turnu al la Grupo, ĉe Antwerpsestraat 45, BERGEN-OP-ZOOM, Nederlando.

***Konciza kompendio por ludi la klavaron per Klavarskribo** : eldonita de Klavarskribo, Slikkerveer, Nederlando. Prezo : 3 ŝil., afr. 2 p. (Vidu reklamon en la Julia numero).

La akiro de kapablo legi muzikon por la piano kaj orgeno estas malfacila tasko, kiu malhelpas al la plejmulto el ni ludi tiujn instrumentojn. *Klavarskribo* estas metodo skribi pianmuzikon kaj celas simpligi la legadon.

Vertikalaj linioj estas arigitaj duope aŭ triope kiel la nigraj klavoj de piano. La interspacoj reprezentas la blankajn klavojn. La notoj estas montritaj per punktoj sur la linioj, kaj ringetoj en la interspacoj. Streketo dekstren aŭ maldekstren montras per kiu mano ludi la noton. Oni legas de supre malsupren kaj tiel havas antaŭ si bildeton de la fingropintoj sur la klavoj. Ĉiu noto ĉiam havas la saman signon.

La nederlandaj eldonistoj diras, ke preskaŭ ĉiu muziko estas havebla en *Klavarskribo* kaj certe ili montras sian iniciatemon per la eldono de ampleksa bruŝuro en Esperanto, kiu ebligas al kiu ajn mem provi la metodon.

Mi pretas akcepti, ke *Klavarskribo* estas logika kaj praktika solvo de la problemo de muziklegado, sed ĝi ne helpas percepti la teorion de muziko.

H.

Deutsch-Esperanto Taschenwörterbuch de J. Kühnel, Wulffsblöcken 36, HAMBURG, Germanujo. Kartonita 11.8×8.3 cm. 192p. prezo nemontrita.. Germ.-Esp. poŝvortaro.

Klitsøgaard, Hotelpension. Ilustrita prospekto kun Esperanta teksto. Klint Pr., Nykøbing S, Danujo.

Budapest : bele ilustrita prospekto pri la Hungara ĉefurbo, kun Esperanta teksto. Urba Turisma. Oficejo, Deák Ferenc-u.2, Budapest. V. Hungarujo.

Interstena Ligilo : provizora bulteno por Interstenomovado. prezo 1 int. resp. kup. ĉe Bengt Joelsson, Köping, Svedujo.

Vizitu la Altajn Tatroyjn : tre bela ilustrita prospekto pri la Tatraj montoj en Slovakujo, kun Esp. teksto. Štefan Toth, SVIT (Altaj Tatroyj), Slovakujo, Ĉeĥoslovakujo.

Banloko Rajecké Teplice ; **Sanatorio** en Vyšné Hágy, ambaŭ en Ĉeĥoslovakujo, eldonas belan ilustritan prospekton en Esp. Oni sin turnu al : Utsr. socialna poistovna, Bratislava, ĈSR.

Tutmonda Junular-Organizo : informbroŝuro pri la celoj kaj organizo de la Esp. junularmovado. Havebla ĉe TJO-centro, W.-Graafdiijk, Nederlando, po 1rp.

Racia kaj Internacia Kemia Nomenklature (*Kritikaj Studoj pri la Sistematiko kaj Logiko de la Kemia Nomenklature*) de Dipl.inĝ. Curt Dellian. Eld. Inĝeniera Sekcio, Esp.-Centro, München 23, Postfach 47, Germanujo. 29×20 cm. 36p. Broŝ. maŝinskribaĵo multobligita ; prezo 2 rpk.

En la enkonduko al ĉi tiu grava verko, la aŭtoro atentigas, ke la kemia vortaro (nacilingve kaj en Esperanto) estas miksaĵo de trivialaj kaj raciaj terminoj. Ofte, nomo por iu substanco ŝajnis tute racia kiam oni enkondukis ĝin sed nun oni povas proponi pli taŭgan. En la naciaj lingvoj oni renkontas sufiĉe fortan kontraŭstaron kontraŭ la anstataŭigo de ĝenerale akceptitaj nomoj por nomoj novaj, kaj tial fremdaj, eĉ kvankam ili estas raciaj. Li tamen opinias, ke *la malaprobo de novaj esprimoj nur rilatas al naciaj lingvoj* kaj sekve li proponas por uzado en Esperanto multajn terminojn, kiuj ja estas raciaj sed neniel estas internaciaj.

Kontraŭ tio, aplikante la 15-an regulon de la *Fundamenta Gramatiko*, multaj sentos, ke internacieco ofte estas pli grava ol severa racieco ; ke, ekzemple, substanco nomata *cyclohexane* angle kaj france, *Cyklohexan* germane, *ciklogeksan* ruse, *cyklohexaan* nederlande, *cicloessano* itale, kaj tiel simile ĉiulingve, prave nomiĝas *cikloheksano* Esperante, sed ne *fano* kiel proponas la aŭtoro.

Al la aŭtoro ŝajne ne gravas, ke iuj nomoj jam troviĝas en la multaj kemiaj terminaroj, kiuj jam aperis en Esperanto (pri kiuj li nenie aludas), nek ke iuj ja estas oficialaj. *Malpermesataj estas la jenaj : azoto anstataŭ nitrogeno . . . tungsteno anstataŭ volframo, antimono anstataŭ stibio . . .* Kiu rajtas malpermesi ? Ni rajtas nur proponi alternativajn vortojn, kaj tion fari nur kiam grave utilas.

La verko tamen enhavas multon, kio estas grava kaj valora. Ĝi estas serioza provo ordigi la tutan kemian nomenklaturon—la nomadon, tio estas, de substancoj ; oni ne pritraktas la ceteran vortaron de kemio, pri aparatoj, reakcioj, teorioj k.t.p. Sed la pritraktado de la substanc-nomoj estas tiel detala, kiel en la plej gravaj nacilingvaj verkoj pri la temo, eldonitaj de la *American Chemical Society* kaj similaj aŭtoritoj.

Troviĝas ĝisdate kompleta listo de la elementoj ; la aŭtoro prave rekomendas la forlason de *um* ĉe la nomoj de metaloj (krom kiam ĝi estas necesa por eviti homonimon, kiel ĉe *radiumo*), kaj la nomadon de acidoj laŭ ties saloj (ekz. *kloridacido*, ne *hidroklorika acido*, *klorhidrika acido* aŭ simile). Li bone pritraktas la nomadon de la tuta serio de sulfuracidoj, de la nitrogenaj (azotaj) oksidoj k.t.p. kvankam estus preferinde sekvi la ĝeneralan kutimon en Esperanto, skribi la nomojn de

saloj kaj esteroj duvorte—*natria pentationato* ja estas pli klara ol *natripentationato*, kaj ĉe esteroj efektiva miskompreno povas rezulti el la uzo de unuvorta nomo. Ankaŭ ŝajnas pli logike montri la grupon HO- per la sufikso *hidroksi* ol per la proponata *oksi*, eĉ se la lasta estas pli internacia.

En la organika fako li plendetale pritraktas ne nur la nomadon de la diversaj klasoj kaj individuaj substancoj, sed ankaŭ la numeradon (ciferigon) por montri la poziciojn de substituantoj. Ĝis nun nenio tiel detala ekzistis en Esperanto kaj ĉi tiu parto eble estos utila al Esperantaj kemiistoj, kiuj povas flue legi nek la anglan nek la germanan lingvojn, en kiuj la plimulto de ĉi tiaj pritraktaĵoj estas ĝis nun verkitaĵoj. La prezo estas, krome, mirinde malalta.

La interna kovrilo portas la vortojn *Scienca Rondo 1948, Ĝenerala fakgazeto por Fiziko, Kemio, Medicino, Biologio* donante al ni la esperon, ke simile gravaj kontribuadoj aperos pri aliaj sciencoj. La verkontoj nur bridu iomete sian entuziasmon pri originalaj ideoj kaj respektu iom pli la firme establitan tradicion, kaj aliaj kontribuadoj estos valoregaj !

D. R. Duncan

Systematisk kurs Esperanto (Sistema kurso de Esperanto) de Seppik-Malmgren. Eld. Eldona Societo Esperanto. Broŝ. 17.1×12.1 cm. 80p. Prezo nemontrita.

Jam la sepa eldono atestas pri la populareco de ĉi tiu sveda lernolibro. Modelaj tekstoj, klara preso, bela papero estas aldonaj rekomendoj.

Feuilles Encyclopédiques de Documentation Espérantiste : Fascicule No. 4 (Majo 1948). Aldono al la jam konata serio de altvaloraj informoj pri ĉiuj aspektoj de Esperanto.

Prospektoj kun Esperanto-teksto estas ricevitaĵoj el : Ĉeĥoslovaka Vojaĝa Informa Servo, **TABOR**, ĈSR. (ilustrita) ; Syndicat d'Initiative, **THIERS**, P. de D., Francujo (ilustrita) ; kaj cele al la Universala Kongreso en 1949, belege ilustrita faldfolio de la : Information Bureau, **BOURNEMOUTH**, Anglujo.

Pordo-ŝildo metala, blanke kaj verde emajlita, kun verda stelo kaj surskribo *Esperanto Parolata* ; eldonita de Asocio de Laboristaj Esperantistoj, Amsterdam W., Roelantstr. 4, Nederlando. Prezo 0.65 fl.

Urbo Sao Paulo : aldone al nia anonco en la numero por Julio/Aŭgusto, oni sciu, ke ekzemplero estas ricevebla kontraŭ 10 resp. kup. ĉe Brazilia Ligo Esperantista, Praca da Republica 54, Rio de Janeiro.

ENIGMA KONKURSO N-ro 30

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, BRUSSEL-Uccle, Belgujo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 26-a konkurso : S-ro M. Cornet (Ned.) 118p., S-ro T. K. Slade (Brit.) 115p., S-ro V. Marcone (Ital.) 113p. Gajnis la premiojn post kontrolo de la 27-a konkurso : F-ino J. J. v. Thiel (Ned.) 121p., S-ro L. Staal (Ned.) 113p., S-ro Fr. Kreutzberg (Germ.) 112p (lote). Sekvas post ili (post kontrolo de la 27-a konkurso) : S-ro E. Riedel 112, S-ro A. Frolišek 109, S-ro P. Schwerin 105, S-ro H. Evers 99, S-ro W. Simon 97, F-ino N. Hanson 92, S-ro A. H.v.d.Broek 79, S-ro C. Rogister 78, F-ino W. M. Millenaar 78, S-ro B. S. Trier 78, S-ro A. Hering 78, S-ro R. Pannenberg 78, S-ro L. M. Deane 77, F-ino E. Jayet 75, S-ro L. P. Flenz 75, S-ro S. Roelofsen 72, S-ro M. Tauil 71, S-ro D. W. Robson 68, S-ro I. Ekström 67, S-ro L. Paeleman 67, S-ro G. Rust 66, S-ro F. Jelenc 60, S-ro B. S. Ohana 60, S-ino C. M. E. den Hollander-Mighorst 58, S-ro D. W. A. Henskes 56, F-ino B. Howell 53, F-ino J. Dedieu 53, S-ro A. Stanura 52, S-ro F. Taylor 49, F-ino M. J. Top 48.5, S-ro A. Jensen 48, S-ro A. Marmenout 44, S-ro M. Rétot 44, F-ino A. Reiné 42, S-ro E. Schmitt 40, S-ro J. Yben 40, S-ro J. Garbar 40, S-ro R. Pawlik 38, S-ro K. Ridder 37, S-ro W. P. Roelofs 36, S-ro P. Brunet 35, S-ro P. Kustaanheimo 35, S-ro J. Soyeur 34, S-ro W. Manders 34, S-ro G. Englert 34, S-ro E. Dahlmann 32, S-ro A. de Vries 30, S-ro G. P. Faraco 30, S-ro J. Slavek 30, S-ro L. Rogez 30.

Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias tion, mi ripetas, ke ĉiu MA kun la sama ŝanco povas komenci la ensendon de la solvoj je kiu ajn momento. Por ĉiu tute korekta solvo mi ordinare donas 5 poentojn, por havi la eblecon rekompenci ankaŭ ne tute korektajn solvojn per malpli da poentoj. Tiuj poentoj estas enskribataj en liston kaj ies poentnombro kreskas se ŝi aŭ li daŭrigas la ensendon. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion kaj ilia poentnombro estas nuligata. Se ili daŭrigas la ensendon, ili komencas denove kun 0 poentoj. Tiel 43 personoj jam ricevis premio(j)n inter kiuj 12 gajnis dufoje kaj 7 trifoje. Tiu sistemo garantias, ke ĉiu partoprenanto iam gajnos premion ĉar la asigno ne dependas de lotumado. Mi entute ricevis solvojn de 177 personoj el 29 landoj. La premioj konsistas el libroj, kiujn la gajnintoj mem rajtas elekti ĝis la sama valoro por ĉiu. Ĉar la solvoj aperas du monatojn post la enigmoj, la limdato por Eŭropanoj estas 2 monatoj. Ekster Eŭropo oni havas iom pli da tempo. Tiu, kiu deziras pliajn informojn, aldonu respondkuponon.

Enigmo-Konkurso N-ro 27 : Atentigo

Konkursantoj bonvolu noti, ke la ĝusta teksto de Solvo N-ro 61 devus esti : "Al ĉiu, kiu solvas ĉi tiun enigmon mi petas, ke li aŭ ŝi skribu tion al mi, por ke mi sciu, kiom da membroj—abonantoj interesiĝas pri la enigmoj." S-ro Mooy ne respondecis pri la eraro en la presita solvo.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 28 :

N-ro 61 (63) : Horizontale oni legas : stenografado, teleroanasor, elementtremn, refoldorusti, egaroozonoet, ornamleporoo, matleonosokl, emoangiloteo, tordsatorapg, rokiomogivoi, irisobeikoro, oleandrooleo. L.l. anstataŭ *belforma floro* devis esti *okulmembrano*. La eraro ekestis ĉar en mia lingvo la floro nomiĝas *iris*.

N-ro 62 (64) : adepto, afero, aŝo, alteo, apetito, aprilo, ardeo, atleto, atriplo, atuto, dalio, datur*, dieto, drapo, duelo, dueto, etato, felto, ferio, fluto, frato, furio, lardo, latero, lepro, lifto, litero, litro, liuto, lutro, paletro, palto, parto, partio, paruo, paŝtelo, patro, pedalo, pelto, perlo, petardo, piedo, pirato, piŝto, plado, pleto, pluŝo, prelato, preludo, pudelo, pudro, radio, ŝalupo, ŝildo, ŝpato,

ŝtalo, ŝtato, ŝtipo†, ŝultro, tafto, talero, talio, talpo, tapeto, tapiŝo, tarifo, teatro, terapio, tetrao, tetro, tiaro, trefo, trilo, tripo, trufo, trulo, trupo, truto, tualetto, tulipo, turdo, turto, utero.

* *detalo*

† *ŝtupo*

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 29 :

N-ro 65 : (T)iam atendas nin rekompenco
La plej majesta kaj riĉa :
Nia laboro kaj pacienco
La mondon faros feliĉa !

N-ro 66 : Se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas (46). Hakado de ligno donas lignerojn (273). Laboro kaj pacienco kondukas al potenco (1207). Se ne estus se kaj *tamen*, mi al ĉio dirus *amen* (1040). En fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas (252).

Pri Esperanto-kolonio en Gvatemalo

Per la anonco en la Maja numero, oni precipe volis scii, ĉu ekzistas la bezono por tia kolonio. Preskaŭ 200 personoj respondis al nia Delegito en tiu lando kaj esprimis sian deziron partopreni la projekton. Kiel oni povas atendi, la plimulto de la anoncintoj estas malriĉuloj, al kiuj mankas rimedoj por iri en Centran Amerikon. Tiuj migremuloj povos transiri la Atlantikon nur per la organizaĵoj troviĝantaj en la respektivaj landoj. Necesas emfaze klarigi, ke en Gvatemalo **men oni neniel financos la vojaĝojn al tiu lando.** Oni do ne malŝparu la tempon de la organizanto kaj aliaj per senfruktaj petoj pri helpo. Oni kompreneble rajtas pagi la proprajn kostojn.

La oficialaj instancoj en Gvatemalo tamen faciligos la koloniadon por tiuj kiuj alvenos. Ili disponigos senpagan vizon por ĉiu migronto, kiu devigos sin loĝi en la lando dum pluraj jaroj ; garantios la vivrimedojn de la enmigrinto kaj familio dum dek monatoj post la alveno, provizos maŝinojn, ilojn, semojn k.s. Al ĉiu familio oni donos terpecon, kaj al la komunumo terenon, kiujn ili ekspluatu per kamp- kaj arbo-kulturo, industrio k.s. La instancoj disponigos sociajn servojn kaj edukon kaj eĉ proporcian monsubvencion al la komunumo.

En la komenco la vivo ne estos facila, ĝi eĉ estos peniga, sed por homoj, kiuj sincere volas konstrui novan vivon, kun Esperanto kiel komuna lingvo, la entrepreno malfermas interesajn perspektivojn.

Jules Bonge,

Del. de U.E.Ā. en Gvatemalo

Companeros, junulara gazeto, calle Canelones 1122, MONTEVIDEO, Urugvajo, Sud-Ameriko, interesiĝas pri Esperanto kaj serĉas junularajn kontaktojn kun la tuta mondo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 208

9an de Aŭgusto 1948

Nova aliĝinta asocio : Asocio de Esperantistoj en Pollando, ul. Marszalkowska 81/32, Warszawa.

Novaj Komitatanoj.

S-ro I. Dratwer, 11 Listopada 22, T.O.Z., Warszawa, Polujo.

S-ro E. Bugajski, Zabkowska 38 m. 14, Warszawa, Polujo.

DELEGITOJ

Angolo

Luanda. D : J. E. Silva Júnior, Caixa postal 804.

Aŭstrujo

Bregenz. FD (Literaturo) : H. Königstedt, Mehrerauer Str. 67.

Krems a/Donau. D : J. Withalm, Reitenhaslachergasse 3.

Belgujo

Bruges. D : F-ino Y. Thooris, Astridlaan 160, Assebroeck lez Bruges.

Ciney. D : G. Petitjean, rue du Commerce 41-43. Tel : 471.

Jabbeke. FD (Turismo) : C. Tousseyn, Statiestraat 35.

Britujo

London, S.E.4. VD : J. C. Rapley, 86 Buckthorne Road, Brockley.

Ĉinujo

Ĉengtu. D : S-ro Eltunko, Poŝtkesto 115.

FD (Ĵurnalismo) : La D.

Danujo

Ĉefdelegito. L. Jakobsen, Carit Etlarsvej 14, Aabyhøj. Tel : 257.

Hallund. FD (Farmacio) : P. Møller, Hallund pr Brønderslev.

Raarup. FD (Instruado) : C.P. Wolder, Raarup Skole, Raarup.

Francujo

Bégles (Gironde). D : R. Ferdinand, 20 Rue du Béquet.

Lons-le-Saunier (Jura). D : N. Epstein, 32 Rue St. Désiré.

Oyonnax (Ain). D : P. Coulot, 18 Avenue Jean Jaurès.

Paris. FD (Maristaj aferoj) : E. Chicot, 24 Av. Ledru-Rollin, Paris XII.

Salins (S. et M.). D : Jean Martinet, P.T.T.

Vesoul (Hte. Saône). D : R. Roy, 43 rue Gerome.

Vienne (Isère). D : S-ino R. Uline, cê Syndicat d'Initiative.

Germanujo

Bremen. FD (Mondfederalismo) : G. Mohwinkel, Herderstr. 10, (23) Bremen.

Büsum. D : R. Pfütze, Hafenstr. 12.

FD (Ŝako) : La D.

Mainz. D : P. Becker, Bleichstr. 21, (22b) Mainz-Weisenau.

FD (Komerco) : La D.

Hindoĉinujo

Saigon. D : Cau Phan Van, 27/10 rue Mayer.

Indonezio

Sabang. D : A. C. van Ingen, Sabang, Pöeloe Weh.

Italujo

Sassari. D : A. Martellotta, Casella Postale 58.

Tortona. FD (Stenografio) : C. Daglio, via Campanella 35.

Jugoslavujo

Dubrovnik. FD (Filatelo) : A. Kiridžija, Izmedju Vrtova 14. Tel : 636.

Karlovac. FD (Filatelo) : J. Vukšinić, Trg Maršala Tita 3, FNR.

Osijek. FD (Fotografio) : M. Benca, ul Petöfi-Šandora 38, Osijek VI.

Sibenik. D : Rade Petkovic, str., Nove Crkve.

Zadar. D : Franjo Majetic, Nacia Teatro.

Zagreb. FD (Akvokondukaj aferoj) : M. Gjivoje, Vodnikova 19. Tel : 88-12, 88-13.

Kolombio

Barranquilla. D : J. Tenenbaum, Carrera 39, 32-01.

Maroko

Oued-Zem. D : Fernand Knecht, météo.

FD (Meteorologio) : La D.

Nederlando

Bergen op Zoom. D : H. A. Appel, Zuidoost-singel 5.

Vlissingen. D : F-ino C. W. But, Sottegemstraat 66.

Sud-Afriko

Pretoria. FD (Inĝenieraj aferoj) : U. P. Ronald, 280 Devenish Street.

Svedujo

Göteborg. FD (Fruktokulturo) : E. W. Anjou, Rosenplantskolan, Box 5023, Göteborg 5.

Strängnäs. D : B. Beckman, Samtingstorget 4. Tel 919. FD (Historio) : La D.

Usono

Bell Gardens (California). D : C. H. Briggs, 6100 Buell St.

ŜANĜOJ.

Aŭstralio

Nth. Curl Curl. D : vakas.

Shepparton. D : vakas.

Aŭstrujo

Bregenz. FD (Junularo) : vakas

Belgujo

Assebroek. D : vakas.

Brazilo

Rio de Janeiro : VD : ĝusta adreso : Rua Goiaz 276-c/3, apt. 201.

Britujo

Chelmsford. D : nova adreso : "Ying Wa", Great Waltham.

Derby. D : vakas.

Godalming. D : vakas.

Henley. D : vakas.

Inverness. D : vakas.

Ĉilio

San Fernando. D : nova adreso : Maipú 390.

Danujo

Aarhus. FD (Ekonomio) : vakas.
København. FD (Farmacio) : vakas.
Kolding. FD (Filatelo ; Instruado) : vakas.
 FD (Junularo) : nova adreso : Nrd. Ringvej 68.

Francujo

Douai. D : nova adreso : 16 Rue Morel.
Saintes. D : vakas.
Saint-Etienne. VD : vakas.
Sochaux. D : vakas.

Franca Ekvatora Afriko

Brazzaville. D kaj FD : vakas.

Germanujo

Augsburg. FD (Gazetaro) : vakas.

Hispanujo

Madrid. D : vakas.

Hungarujo

Pestszentlőrincz. D : nova adreso : Kosztólanyi D. str. 60.
Sashalom. D : nova adreso : Stromfeld u. 1.

Italujo

Carbonara Scrivia. FD (Stenografio) : vakas.
Grottaferrata. D : vakas.

Jugoslavujo

Bjelovar. D : nova adreso : Varšava ul. 2.
Dubrovnik. D : nova adreso : Izmedju Vrtova 14.

Kenjo

Nairobi. D kaj FD : li estos en Anglujo dum kelkaj monatoj, kaj dum lia foresto agos kiel delegito S-ro J. Williamson, P.O. Box 2022. Tel : 5269

Maroko

Ĉefdelegito : vakas.
Casablanca. FD (Filatelo ; Ĵurnalismo) : vakas.
 FD (Flegado) : vakas.

Nederlando

Amsterdam. FD (Spiritismo) : vakas.
Leeuwarden. FD (Religio) : vakas.

Polujo

Ĉefdelegito : nova adreso : ul. Parafialna 3, Nowa Sól.

Sud-Afriko

Johannesburg. FD (Inĝenieraj aferoj) : vakas.

Svedujo

Billdal. FD (Fruktokulturo) : vakas.
Lund. FD (Scienco ; Universitataj aferoj) : vakas.
Nörrköping. FD (Reklamado) : nova adreso : Norra Promenaden 57-I.

Usono

Fresno. D : nova adreso : 4903 Thorne Ave.
San Pedro. D : vakas.
Seattle. FD (Radio) : nova adreso : 4155 Union Bay Lane.

HONORA MEMBRO

S-ro R. Rian, Trondheim, Norvegujo.

DUMVIVAJ MEMBROJ

S-ro A. Spiré, Buenos Aires, Argentino.
 S-ro A. Vila Maynon, Buenos Aires, Argentino.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1948

314. S-ro A. R. Cartwright, Camberley, Anglujo.
315. S-ro L. A. Churchill, Derby, Anglujo.
316. S-ro J. Piatkowski, Wroclaw, Polujo.
317. D-ro Z. Vugrinec, Sl. Pozega, Jugoslavujo.
318. S-ro B. Rajšić, Zemun, Jugoslavujo.
319. S-ro R. Karlson, Camden, N.J., Usono.
320. D-ro J. Payzebrune, Szamotuly, Polujo.
321. S-ro W. Sochatynski, Przemysl, Polujo.
322. S-ro S. Culbert, Seattle, Wash., Usono.
323. S-ro R. T. Sandberg, Seattle, Wash., Usono.
324. S-ro J. Kosicki, Łódź, Polujo.
325. S-ro A. Blid, Nynäsham, Svedujo.
326. S-ro B. P. Blöndal, Hvammstanga, Islando.
327. S-ro T. Rogalinski, Radom, Polujo.

DONACOJ. T. J. Gueritte 22ŝil. 6p., R. Harding 7ŝil. 6p., C.J.S. Kitching 15ŝ., S. Gačić 10ŝ., A. Crnica 5ŝ., A. Kiridzija 3ŝ., Fr. Šlogar 25ŝ., H. B. Audich 5ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario*

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Norro-Callewaert. Al Ges-roj A. Norro-Callewaert en Brugge, Belgujo, je la 14a de Junio naskiĝis la unua infaneto Catherina.

Ó hUiginn. Je 28a de Junio al Síghle kaj Lorcán ÓhUiginn, delegito de UEA en Dublin, Irlando, filo, Colm Brian.

Pombrol Diaz. Al S-ro A. Pombrol Hernandez, VD de UEA en La Laguna, Kanariaj Insuloj, kaj lia edzino Consuelo Díaz, je la 15a de Junio naskiĝis la unua infaneto, filino nomita Dácil.

Edziĝoj

Mallet-Maertens. Je la 20a de Julio edziĝis Germaine Mallet kaj Gregoire Maertens en Brugge, Belgujo.

Nesbitt-Thornton. Edziĝis 27an de Julio 1948, S-ro William John Nesbitt kun F-ino Sylvia Jean Thornton, ambaŭ el Sleights, Yorkshire, Britujo. Koran gratulon!

Niaj Mortintoj

Ni sciĝis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

Dylewski, Boleslaw, pola samideano, forpasis 34 jaraĝa, 5an de Junio 1948 en Upsala, Svedlando, kie li laboris en pola ambasadorejo.

Ferguson—Je la 25a de Majo forpasis Pastro G. A. Ferguson, en Barnetby, Anglujo. Li estis 81-jara kaj Esperantististo dum pli ol 40 jaroj.

Grimmitt—Je la 27a de Junio forpasis en Herne Bay, Anglujo, Vincent Grimmitt, 80-jara. Fervora propagandisto dum multaj jaroj.

Grugeon—Forpasis je la 28a de Junio nia Delegito en Henley-on-Thames, Anglujo, S-ro C. A. Grugeon, 59-jara.

Lundkvist—Je la 27a de Julio forpasis nia delegito en Lulea, Svedujo, Emil Lundkvist.

Mackenzie—Mortis je la 15a de Majo nia membro en Halesowen, Anglujo, S-ro C. V. Mackenzie.

Silveira Sobrinho—Mortis je la 7a de Februaro en Rio de Janeiro, Brazilo, nia membro Generalo José A. Silveira Sobrinho. Li estis fervora Esperantisto kaj iama Prezidanto de Brazila Klubo-Esperanto.

Woudenberg—Je la 18a de Aŭgusto forpasis S-ro L. Woudenberg, en Bossum, Nederlando. Li estis meritplena laboranto por Esperanto, aparte en Kristanaj rondoj en sia lando.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu du da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Fr. Svačina, Lanžhot, Ĉeĥoslovakujo, koresp. kun tuta mondo pri jenaj temoj : (1) Bredado de senkornaj kaprinoj, laŭ plej moderna metodo. (2) Pri tuta homa vivo de naskiĝo, ne nur ĝis morto.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Vjekoslav Bošnjak, Slav Orahovica, Jugoslavujo, deziras interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Kolektantoj de oficialaj poŝtaĵoj kun esperanta teksto skribu viajn adresojn. Mi volas kunigi ĉiujn tiajn kolektemulojn kaj sendos adreslistojn. Mi petas detalan informon pri aperintaj poŝtaĵoj eble kunsendante specimenon. Mi rekompence resendos p.m. aŭ stampon de Esp. Kongreso München, kaj interŝanĝos p.m. Pliajn informojn de Rüdiger Eichholz, (20b) Grone/Göttingen, Bünne 19, Germanujo.

Pola skoltino (18-jara) deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Jachówna Wanda, Pabianice, Karniszewska 18, Polujo.

25-jara altlerneja studento deziras korespondi kun esperantistoj el la tuta mondo. Speciale mi interesiĝas pri novaĵoj kaj vivo de Abisenlando. S-ro Tony Storch, Praha-Břevnov, Stará cesta 1290.

Korespondanto dezirata en Sovetunio. Amasanti, 50 Lancaster Road, Londono, W.11.

Atentu! Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Nepre respondos. José de Abreu. Junta dos Lacticínios da Madeira, Funchal, Madejro.

Filatelistoj el ĉiuj landoj! Ĉu vi estas fervoraj kolektantoj? Bonvolu peti informojn pri Madejra Filatela Klubo. Skribu multnombre al prez. : D-ro J. C. Tavares da Silva, Rua do Aljube, 49, Funchal, Madeira.

Mi vokas al ĉiuj zoologoj—zooteknikistoj (pri dombestoj) en la tuta mondo kaj deziras korespondi kaj ŝanĝi fakajn fotografaĵojn kaj spertaĵojn. Havel Josef, kontrolasistanto, Libňatov, Úpice, Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi pri ĉiuj temoj. S-ro Nils Henning, 26-jara, Långsjövägen 41, Älvsjö, Svedujo.

Poniatowski-liceanoj dankas pro multegaj korespondadproponoj kaj bedaŭras, ke estas neeble respondi al ĉiuj.

Svedo deziras korespondi kun ekster-eŭropaj s-anoj. Nepre respondos! S-ro Birger Olsson, Box 82, Arvika, Svedujo.

Américo Caruso, Arenales 65, Necochea, F.C.S., Argentina. Interŝanĝos poŝtmarkojn tutmonde.

Korespondas nur pri Esperanta literaturo kaj lingvaj problemoj, S-ro Capp., 4 Moore Flats, Gilbert Street, London, W.1., Anglujo.

Por junaj geesperantistoj serĉas gekorespondantojn el la tuta mondo: S-ano Fr. Buhr, Praha-Břevnov 514, Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi: S-ano Tibor Simon, Tábor 5, Světec u. Biliny, Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi: S-ano Ant. Pamykal, Boršice 187. p. Blatnice p. sv. Ant., Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi: S-ano Josef Nožička, Boršice 219. p. Blatnice p. sv. Ant., Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi: S-ano Josef Zlomek, Boršice 266. p. Blatnice p. sv. Ant., Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi: S-ano Jan Bar, Vyškov—Nouzka 40, Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi: S-ano Pavol Bunčák, studento, Hlohovec, Stalinova 5, Ĉeĥoslovakujo.

Belajn poŝtkartojn deziras interŝanĝi kun Afriko, Azio, Aŭstralio kaj Ameriko, S-ano Radmil Stínil, Líšný 72, Malá Skála, Ĉeĥoslovakujo.

La Esperanto-cirklo "Hannover-Südstadt" petas alsendi raportojn el tuta mondo. Leter-vesperoj ĉiumonate je la 15-a. Respondo garantiata. D-ro E. Heidemann, Hannover, Bischofsholer Damm 52, Germanujo.

Interesajn faktojn mi bezonas pri generado/distribuo de elektro por fari parolon. Bonvole sendu al J. Blackburn, 21 Torbay Road, Urmston, Manchester, Anglujo.

Interŝanĝas neuzitajn kompletajn seriojn de poŝtmarkoj kun la tuta mondo D-ro Silverio Gallego, Serranos 4, Valencia, Hispanujo.

Kiu sendos al mi 50 pm. de sia lando ricevos la saman kvanton de Pollando. Mi interŝanĝas fotojn. Fotografisto W. Kühn, Pabianice, Pulaskiego 15, Polujo.

Natursciencisto brazila dezirata por serioza interrilatiĝo. Ing. Mario Simondetti, Staurengi 24, Varese, Italujo.

Tre deziras aĉeti kaj pagos malavare por ekzempleroj de unuaj esperantaj broŝuroj, jaroj 1887 ĝis 1892, Esperantista familio Chomette, 8525 Saturn Street, Los Angeles 35, Calif., Usono.

Belan Esp. gazeton sendos japanaj esperantistoj al tiuj, kiuj pagos por ili kotizon de UEA. Skribu al Mijake, Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati 1, Tokio, Japanujo.

Japanoj deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj. Niaflanke estas multaj studentoj—medicinaj, kemiaj, matematikaj, fizikaj, agronomiaj, k.t.p.—laboristoj, oficistoj. Skribu al Mijake, Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati 1, Tokio, Japanujo.

Gesinjoroj R. E. Holland, 104 N. Julian St., Naperville, Ill., Usono, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj eble leterojn kun ĉiulandaj geesperantistoj.

Infano-grupo "verdaĵ paseroj" kaj surdmutulo-grupo "Miki-musoj" deziras korespondi kun la tuta mondo. Adreso: Esperantogrupo Langner, Karl-Marx-Str. 160, Berlin-Neukölln, Germanujo.

Amikoj de naturkuracado aŭ Budhismo ricevos konsilojn kaj detalaĵojn kontraŭ 4 respondkuponoj de Budhana Ligo Esperantista, Manspfad 731, Köln-Brück, Germanujo.

Rikardo Vaudagnotto, Buenos Aires, anoncas al siaj gekorespondantoj, ke pro profesiaj kaŭzoj li devis forvojaĝi alilanden, kaj ĵus reveninte trovis leteramason kiun li ne povas respondi. Mi petas senkulpigon. Kiel eble mi rekompencos vian ĝenon. Dankon!

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiulandanoj José Rufes, Calle Padilla 6, Valencia, Hispanujo.

19-jara studento, Jaroslav Kuzník, Bozený Nêmcové 3, Opava, Ĉeĥoslovakujo, volas korespondi pri div. temoj.

80-jara pioniro. La multjara membro de la Esperanto-societo en Hanovero, August Rehse, Kapellenstr. 1 A, Hannover-Kleefeld, Brita Zono de Germanujo, fariĝos okdekjara la 29-9-1948. Li ankoraŭ vigle partoprenas nian movadon, kaj li certe ĝojus se li ricevus grattulleterojn de la samideanaro.

Jen libro, kiu certe plaĉos al ĉiu !

MORTO DE TRAJNO

de
Freeman Wills Crofts

Tradukita de
Mason Stuttard

La priskriboj de fervoja funkciado estas
brilaj ; la rakonto mem estas ege interesa.
256 paĝoj. Bindita 9 ŝil, afranko 6p.

Eldonita de
ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

S. GRENKAMP

Oficiala Vortaro de Esperanto

Jen vortaro de la oficialaj radikoj kun
klaraj, koncizaj difinoj en Esperanto.

Poŝformata, bele presita kaj bindita.
248 paĝoj.

Prezo : 2 ŝil. 3p., afranko 3p.
(10 rpk. afrankite).

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo.

TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

ekzistas 10 jarojn. Tiukaze aperis 16-p. ilustrita
propaganda broŝuro, kiu enhavas detalajn informojn
pri la estiĝo kaj disvolviĝo de T.J.O. kaj Denaska
Esperantistaro, statuton de T.J.O., kaj liston de
perantoj. Ĉiu, kiu vere interesiĝas pri la junular-
laboro nepre mendu la broŝuron ĉe

TJO-CENTRO
West Graftdyk, Nederlando

Prezo : 5 pencoj aŭ 1 int. resp. kupono

PRI REKLAMOJ PAĜOJN 61 KAJ 131 EN LA JARLIBRO

Sekve de ne-aperinta teksto, oni devas legi : André
(A.3.) Gaillard, 48 Rue de la Glacière, Paris 13e,
Francujo, sendas sciigojn (ne forgesu respond-
kuponojn, poŝtmarkojn) pri "Naturista-Vegetara-
Esperantista-Pacema Organizado" (NVEPO) kaj
ankaŭ, reciproke, deziras ricevi pri samaj temoj, el
ĉiuj landoj, kaj pri Bestprotektado, Forigo de
Mortpuno, ĉiuspeca Protektado de la Naturo, kaj
starigo de "Tutmonda Jara Fastotago" por Paco kaj
restarigo de la homa digno, interpola reamikiĝo.

LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

"... bonege taŭgas por ĝustigi tiujn opiniojn
kaj por forigi la miskomprenojn."—*Heroldo de
Esperanto.*

"... Pri unu afero mi estas tre kontenta ; la
lingvo estas modela."

"... Mi senhezite diras, ke laŭ vidpunkto
pure lingva ĉi tiu verko estas la plej kontentiga,
kiun mi ĝis nun legis en Esperanto . . . la
frazoj portas la stampon pri instruiteco kaj
ŝato pri la plej ĝusta vorto por atingi la
bezonatan nuancon . . . La rezulto estas libro
pri kiu iu ajn literaturo povus esti fiera. Por
la Esperanta ĝia valoro estas netaksebla . . ."—
Esperanto Internacia.

531 paĝoj, 19 × 14 cm., broŝ. 10ŝ. 6p.,
tole bind. 12ŝ. 9p., duonlede bind. 25ŝ. 6p.,
afranko 9p.

Mendu ĉe **U.E.A.**